

Fajrero_{n-ro} 4

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

MALFERMITA LETERO AL JOE SMITH.

(Vladimír Sís, "Kultura" n-ro 35-1961, tradukis Jer.)

Sakre, Joe ... eble tiu via inĝeniero ĉi tion bone tradukos al vi....

Vi scias, Joe, mi ne ŝatas skribi. Ankaŭ la patrino ĉiam plendas -kial ni pro Dio almenaŭ vorteton ne sendas- kiam mi ie muntas.

Mi konstruas pontojn. Vi ja scias imagi la ĝojon, kiam linioj kaj ciferoj sin aranĝas je pilieroj kaj traboj, kaj sur tiuj linioj -ĉar ni scias ilin kurmeti- poste veturas aŭtoj kaj vagonaroj. Ankaŭ de sur ili buboj kraĉas en akvon.

Nenio mirinda, mi scias. Ni venis por streĉi la muskulojn, ĉu ne? Sed kian signifon havas - konstrui ekzemple tiujn pontojn -se estus fiuletoj, kiuj volas ilin ĵeti en aeron?!

Mi havas du iafanojn -bubon kaj bubinon -nenio mirinda, ĉu ne? Foje libertempe mia edzino montris grandan persistemon kaj iom post iom konvinkis min, ke mi por momento lasu la fiŝojn kaj iru por la infanoj konstrui akvan muelileton.

Mi do konstruis ĝin. Bone ĝi turniĝis, frapetis... eĉ nokte ĝi ne ĉesis.

Sed iuj kanajloj matene ĝin detruis. Mia bubo ilin kuratingis. Sekvis interbato. Hazarde mi estis iom proksime. Mi diris: "Interbati sin ne havas sencon, sed kial vi, nu, ĝin detruis - se tia aĵo estas por ĝojo?" Ili vere ne sciis, sed respondis nur tiel, por ion diri: "Al ni iel ĝenas vidi belan aĵon - se ĝi ne estas nia!" Mi diras idiotoj, tia aĵo ja povas esti por ĉiuj -ĉu ne?

Mi ja ne devas havi aeron kaj akvon kaj arbaron markitaj!

Sciu, mi eĉ limojn ne tro komprenas -mi opinias, ke ekzemple birdoj pro tio devas ridi. Sed la birdoj ne ridas kaj ni eĉ ne scias, ĉu tio estas por ili ridinda.

Ŝajnas al mi, ke mi perdis la temon.

Mi volas al vi skribi nur -espereble vi povas tion influi, almenaŭ mi pensas ke jes, ke inĝeniaj homoj, ne desegnu planojn kun diversaj konstrukcioj interne ŝtopitaj per fiaĵo, kiu post ekkrako kuŝas dudek jarojn en homaj stomakoj kaj voras homan haŭton! Mi vidis tion en kino kaj mi estis terure kolera pro tiaj bestiaj elpensajloj.

Joe, se vi eble ne faladis bomboj, sed viaj knaboj kuŝas ĉi tie en Eŭropo en sablo kaj argilo, kaj tute ne aŭdis finfajfigi la militon.

Kion vi opinias, se ili leviĝus - ĉu al la aĉuloj kun bomboj ili frapus la vangojn?, aŭ almenaŭ riproĉus ilin kiel mi la bubojn, kiuj detruis la muelileton....

Mi opinias, ke la mortintaj knaboj fortusus la kaŭzojn - kiaj estas la Marko aŭ ŝtatintereso.

Ĉar ni estas pliaj ol la idiotoj kun la danĝeroj timigiloj, mi skribas al vi - ĉu ni, anstataŭ la knaboj, kiuj jam estas en la tero, ne povus ion fari? Mi pensas, ke al ni

estas ĉio klara kaj estas plej progressa tempo. Ni ja ne konstruas, aŭ ne faras aŭtojn kaj ne nutras bovinojn pro tio, ke iu ĵetu ĉion en aeron. Vere ŝajnas, ke estas la tempo por tion diri al ĉiuj frenezuloj.....

Sciu, mi pli ŝatas vidi, kiel buboj kraĉas de sur ponto en ekvon ol pontoruinojn droni en marĉo kaj bubojn en fosaĵoj ĉe aŭtomataj pafiloj.

Skribu al mi, kion vi opinias pri ĉio ĉi.

Via Josef Novák.

Da tiuj estas ĉe ni same tiom kiom ĉe vi da Joe Smith-oj.

LA TENDARO EN CIFEROJ

I-a etapo			klasa konsisto:	
en la kurso	A	28 kurs.	laboristoj	24
	B	15 "	instruistoj	8
	C	23 "	studentoj	20
	D	8 "	oficistoj	18
instruistoj		8	div. profes.	4
teknika pers.		3		

II-a etapo				
en la kurso	A	38 kurs.	laboristoj	12
	B	19 "	instruistoj	10
	C	11 "	studentoj	23
	D	- "	oficistoj	15
instruistoj		6	div. profes.	8
tekn. pers.		3		

Entute personoj: 85 en I-a etapo
77 " II-a "

En la I-a etapo instruis: Zdeněk Hršel, Vlastimil Novobilský, Oldřich Kníchal, Zdeněk Rusín, Aleš Bednařík, Josef Chvosta, Ludmila Heiserová, Ernest Geleta. Meza aĝo : 26 jaroj.

En la dua etapo instruis : Karel Franc, MUDr. Josef Černý, Karel Kraft, Ing. Neitus Lipták, Marta Lorková, Věra Podhradská. Meza aĝo : 35 jaroj.

Klasifikaj rezultoj en la II-a etapo: 21 kursanoj eminentaj, 33 tre bonaj, 7 bonaj, 2 sen klasifiko.

En ambaŭ etapoj funkciis kiel ekonomia gvidanto Pavel Sittauer.

La tendaron teknike aranĝis la Esperanto-rondeto de la Distrikta Kultur-Domo en Třebíč.

Ni alveturis dimanĉe per plenŝtopita rapid-trajno. Via humoro estis solena - ni antaŭĝoji pri la restado tie. En aŭtobuso el Ŝumná batalo pri la loko, ne eblis sidi, ni nur sukcesis stari ansermaniere -sur unu piedo (nome la propra, ne parolante pri tiu de hazarda najbaro). Fine Vranov, fino de la aŭtobusa linio - kaj plue nur piede. La kofroj amasigitaj turalte sur la puŝĉareto - kaj ek al la valo.

Finfine la lasta deklivo venkita kaj ni estas sur la kruta vojo malsupren. Glitado, glitado. Kaj jam ni vidas akvon, herbejon kaj baldaŭ nakaŭ la tendojn. Bonvenigo, salutoj, ententigo, kaj fine sento de kontento pro la komforto, kiun ni povis ĝui ankoraŭ kelkajn horojn antaŭ la nokto.

Unua tendarfajro. Zumas la voĉoj, kraketas ligno, leviĝas fumo, flagretas la flamoj, tremetas la lumo. Venas momento de reciproka prezentado.

"Mi estas XY, instruistino el MN, esperantiĝis pasintjare, volas partopreni la kurson B."

"Ĉu fraŭlino?" "Jes", sonas la respondo.

Suspiro de kontento flanke de la ĵunuloj, ĉar la parolantino estas belulino.

Venas vico de iu sinjoro: "Mi estas laboristo mineja, volas partopreni la kurson A kaj estas fraŭla - ĝis morgaŭ vespere, kiam venos mia edzino

Ridoj, aplaŭdoj. Kaj tiel plu iris la prezentado.

Poste kantoj, humuro, ŝercoj, ja eĉ dancoj kaj diversaj ludoj.

Oni ekdormis nur en malfrua nokto.

Mateno je la sesa. Vekiĝu! vek i ĝ u! VEKIĜU!, kaj jam montriĝas diversmaniere taŭzigitaj kapoj en la tendaraj fendoj, enviciĝas kaj komencas la unua gimnastiko. Poste lavado, aranĝado, inspektado de la tendoj, kaj ĉiutaga hisado de l' flagoj kun belega kanto,

"De norda neĝa region' ĝis varma suda sabloland'
niaj salutoj flugu ventrapide...."

Poste sekvas matenmanĝo, kaj jam komencas soni fajfilo por la unuaj lecionoj. Vere rememorindaj momentoj.

Kia estis la unua nokto? Ĉi-jare malvarma, ĉar la ŝtormo ĉion malvarmigis. Dua nokto estis jam tolerebla, kaj la pluaj kaj sekvantaj varmaj. Kuloj, muŝoj nur malnombraj, banado ne distanca, instruado agrabla, nutraĵo hejmeca, kvinfoje dum la tago, do ĉio esperplena,. Kaj la ĉefo: ĉiuj sekvaj tagoj preskaŭ senescepte s u n p l e n a j.

Baldaŭ aperis ideo de ĉasado de l' kastoro, aŭ kiel oni tion nomis "kastorado". Unue kelkaj kuraĝuloj -nemultaj- el kiuj nur unu sukcese plenumis sian taskon nur Esperante paroli dum la diurno, sed poste la nombro multiĝis kaj partoprenis eĉ pli ol 26 personoj.

Sed venis katastrofo: ekskurso al Znojmo. Tie estis tre malfacile konservi la nur Esperantan parolon -oni helpis sin eĉ per skribado aŭ uzo de la germana lingvo, kion la lokaj vendistinoj akceptadis per mirplenaj okuloj.

La ĉasado de l' kastoro fariĝis eĉ objekto de humuro: tiuj, kiuj nur malmulte sukcesis, estis nomataj " k a s t r o l o j" kaj kelkaj eĉ diris, ke ili volas esti "k a s t r o j", el kio sekvis, ke ili volus esti kastrataj pro diversaj kaŭzoj. Speciale la

edzinoj tian diradon akceptadis kun tre diverse varmaj sentoj....

Interesaj estas kelkaj faktoj: troviĝis tie miksaĵo de homoj el Slovakio, Moravio kaj Bohemio, estis tie ĉeĥoj, slovakoj kaj niaj hungaroj. Estis eĉ naŭ geedzaj paroj. Unu paro konkuris kun la alia, sed ne ĉio iris sen grincado: ie ne volis l i lerni, kaj li estis atakata de sia pli ĉarma vivduono, aliloke ree ŝ i ne emis fariĝi esperantistino ... ĉio ĉi gvidis al diversaj diskutoj, ja eĉ disputoj, ofte eĉ humuraj situacioj. Preskaŭ kortuŝis min unu geedza paro, kie ŝi sukcesis konvinki sian edzon, ke li ankaŭ iĝu k a s t r o. Tiu vorto sekvigis lian suspekton, ke ĝi volas riĉigi la rondon hejman kaj krei hejman t r i a n g u l o n.... . En la dua kazo li fariĝis simple k a s t r o l o, pri kio li, post eldemando de sperta esperantisto elspekulis, ke temas pri speciala k a s t a r o l o, do ĉi-kaze relative kontentiga solvo.

Krom tio ekzistis tie multa j neleĝaj paroj kaj paretoj helpantaj sin pli-malpli sincere en la studado. Kaj tiamaniero fluis la vivo relative en solidaj limoj kaj sur solidaj reloj ĝis alveno de la ekzamenoj. La prepara studado estis fakte tre fervora, ja eĉ arda, kiel atestas la fakto, ke unu tendo bruldifektiĝis - ĉu pro kandelflamo aŭ pro la studema flagro – restos nesolvita por ĉiuj tempoj kaj epokoj estontaj.

La dua interesa fakto estis la riĉa apero de gejunuloj. Ili formis preskaŭ 80-procentan plimulton. Troviĝis tie eĉ grizharaj junuloj, kiuj prezentis bonan ekzemplon por kelkaj nediligentuloj. Precipe montriĝis ilia forto dum la ĉasado de l'kastoro, kiam ili bonekzemple elstaris kaj sukcesis gvidi la ceterajn ĝis la sukcesa fino.

La tria interesa fakto - plej ĝojiga - ĉar ĝi signifas tre bonan promeson por la estonto, estis la ĉeestado de la geinstruistoj. Ili estis kaj ĉiam estos la plej grava faktoro en la plua disvolviĝo de la movado, precipe en ĝiaj lastaj momentoj: enkonduko en la lernejojn. Kaj ili estis ĉiuj g e j u n u l o j, do estontaj bonegaj kadroj geinstruistaj, ĉar ni firme kredas, ke ili ne forlasos la movadon kaj plue helpados disvastigadi la gravegan problemon de la internacia lingvo laŭ la devizo: unu lingvo nacia kaj unu internacia por ĉiu homo kaj por ĉiuj epokoj.

Necesas ankaŭ mencii, ke la supron de l'humoro kaj humuro oni atingis en la tago de la t e n d a r a k a r n a v a l o. Partoprenis ĝin plimulto da tendaranoj en plej diversaj improvizitaj kostumoj kaj maskoj. Ne mankis bonaj imitantoj de virinaj figuroj (kio nunepoke estas relative facila). La tuta procesio post glora tramarŝo tra la tendarkampo ekiris al la najbaroj trans la rivereton, kie oni abunde ŝercis, kantis, bruis kaj diversmaniere amuzis sin.

Multe misteraj momentoj venis dum la serĉado de la "perdita tendarano", kiun oni devis serĉi dun malhela nokto en profundega arbarego - kaj kiun oni fine trovis pendumita sur alta arbo. Sed li montriĝis esti remburita blua vestaĵo. Tamen oni kriis helpon de la ĉeesta kuracisto, kiu jam estis dormanta. Li, alveninte, "proponis" sian helpon al la malfeliĉulo tiel, ke li tretis lian gorgon kaj proklamis lin d e f i n i t i v e v e r d a k a d a v r o, kvankam en blua vesto.

Interesa estis ankaŭ prezentado de la filmo el la pasintjara tendarado. Sur la ekrano aperis kelkaj jam konataj vizaĝoj, aplaŭdataj kaj alkriataj per nia konata h u r a o.

Ni eĉ havis okazon kaj feliĉon povi gastigi vizitantinon el POLLANDO kaj samideanojn el Bohemio kaj Slovakio. Potencegaj huraoj akompanis ilian bonvenon

kaj vespere oni ĝojis pro ilia ĉeesto kaj kune kun la ĉarma pola gastino oni kantis kelkajn polajn kantojn.

Tiel dum ĝojoplenaj tagoj kaj momentoj fluis la vivo en la agrabla valo - ĝis fine alvenis la solena momento de la ekzamenoj. Kiel jam menciite, oni multe studis kaj ofte dum la longaj vesperoj multegaj tendoj brilis kandle en la nokton, kaj super la libroj kliniĝadis plej diversaj belaspektaj kapoj geviraj, geknabaj. Nur escepte oni ne volis partopreni la ekzamenojn. Multegaj eminentiĝis - kaj tiam tra la valo soneĥis voĉoj de la h u r a k r i o j - multaj fariĝis tre bonaj; oni povas nur ĝoji pro la intereso kaj fervoro, kiun ni vidis. Ni esperu, ke almenaŭ unu kvarono da ili revenos venontjare por plenumi siajn pli altajn kursojn kaj atingi pluajn sukcesojn sur la gravega kampo de la lingva problemaro.

Alvenis la lasta tendarfajro. Multaj kantoj, ŝercoj, ludoj.

Kaj kiel potenca eĥo eksonis al niaj voĉoj la voĉoj de neesperantistoj trans la valo, kiujn niaj fervoraj kursaninoj sukcesis lernigi la kanteton "Alaŭdeto". Oni povas nur deziri, ke multiĝu la homoj parolantaj la lingvon internacian, kaj ke kresku la batalantoj por la paco.

La nerevenigebla reganto de la kosmo, la tempo, kaŭzas, ke ĉio devas veni al sia fino. Ankaŭ por ni ĉiuj venis la lasta sabato. Jam vendrede multaj foriris, kaj eble kvazaŭ pro tio, la ĉielo esploris: venis, post nokta fulmotondro, printempaspekta, preskaŭ maja, pluvado, daŭranta kun etaj interrompoj la tutan tagon. Ĝi aukaŭ kaŭzis, ke la aŭtoj, kiuj venis en nian valon, ne povis elveni per siaj propraj ĉevalfortoj kaj devis helpi la elpruntitaj ĉevaloj. Tio kaŭzis, ke ĉiuj esperantistoj devis uzi siajn proprajn fortojn por la transportado de la valizoj - dum la pluvo, tra la koto, laĝetoj, marĉetoj kaj ŝlimo. Denove glitado, glitago kaj penega laboro pro la kofroj kaj diversaj valizoj.

Venis, respektive revenis novaj premadoj kaj komplikaj operacioj enaŭtigaj, entrajnigaj, ĉar multegaj diversspecaj tendaranoj kaj sportistoj kaj somerumantoj deziris veni laŭeble plej frue hejmen pro timo antaŭ la alvenanta plorplena sezono de la pluvoj, kies alprorksimiĝon oni sentis.

-.-

EĤOJ EL VERDA KOSMO PRI SET 1961.

Laŭ la teknika flanko la tendaro estis ekipita pli bone ol la pasintjara. Bone impresis 20 novaj tendoj. La manĝaĵoj estis bongustaj. Al la ekonomia gvidanto Pavel Sittauer oni nepre ŝuldas multajn dankojn!

-nav-

- Ni gratulas al ĉiuj D-kursanoj, kiuj pruvis siajn kapablojn: D-ro Kopečková, Inĝ. Felix, Tichý, Skramuský, Klouda kaj Kalina. Ni atendas de vi fervoran pedagogian laboron!

Sciuroj

- Ĉu vi rememoras: Cornštýn - rubojn oni brave venkis, sed la nubojn - dum rekur' venkita sentis!

Kastel - koboldo

- Venonte ankaŭ vi venu en tendaron per aŭtomobilo, ĉar: Aŭto en tendaro, kia bonŝanco - por ĉevaloj en paro, trans kotan distancon!

Ranetoj

- En "Kongreso de popoloj" mi renkontiĝis kun ĉarma havajanino. Mi petas ŝin pri sendo de la adreso al la red. de J. Julian ni ne plu amas!

Romeo

- La konkurso pri originalaj poemoj laŭdire montris kelkajn talentitajn verkistojn. Mi demanas, ĉu mi estas ankaŭ kelka?

Versfaristo

KANTAS NIGRA MARO. F.N.Gumilevski, USSR.

Kantas Nigra Maro sub la suna helo,
Orumitaj nuboj naĝas en ĉielo,
Mevoj brustoblankaj flugas super ondoj,
Argentiĝas vastoj ĝis la horizonto,
sur la bordon plaŭdas tajdo brueganta,
Brilas perlaj ŝprucoj kiel diamantoj.

La etuloj gaje ludas ĉe la maro
Sub la verda tendo de la montarbaro.
Klinas sin patrino super la fileto:
-Mia kara knabo, flustras ŝi impete.
Tempo flugas preter, jaron sekvas jaro.
La maristo juna krozas tra la maro.

Venis la milito, tondras la kanonoj,
Mondon ŝancelegas terurigaj sonoj.
Nigraj nuboj dense tegas la ĉielon,
Nigra Mar' surmetas uragantnantelon.

Ĝemas la patrino, senkonsole ploras,
Pri amata filo sangas ŝia koro.
Ŝtormas en la maro vento-uragano,
Ne revenos hejmen brava marŝipano.

Kantas Nigra Maro la funebran kanton,
Pri la marŝipano, brava batalanto.

Kuras en la maro ondo post la ondo,
Ĝemas pro doloro la vundita mondo.

Al la maro venas la patrino sola,
Ĉiam pri la filo veas senkonsola.

Kantas Nigra.Maro la ribelan kanton,
Tondras de la maro tajdo brueganta.
Tondras ĝi en montoj, tondras ĝi en valoj,
Vokas la homaron por la pacbatalo
Kontraŭ la militoj, kontraŭ atombomboj,
En ĉielaj vastoj ŝvebas la kolomboj.

"KANTETO" (EL SKZOO) K.L Galczyński.

Mi havas nur gitaron,
kaj vin, kaj nokto – miron,
malnovan kanto - aron,
mi ludas laŭ deziro.

Unua kant' - pluv' varma,
dua - nebula lun',
kaj tria eĉ pli ĉarma
ol du ludataj nun.

Amu min, amu kara,
mi kredas en am-horo,
ke estas bril' ĉiela,
kaj stel' en via koro.

tradukis: Marius Dastyh.

LA MOVADO EKSTERLANDE.

La 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazis en bela angla urbeto de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1961. Kongreson ĉeestis pli ol 1700 geesperantistoj el 33 landoj. Ĝi estis solene inaŭgurita la 9-an de aŭg. en urba teatro. Kongreson prezidis s-ro Dro. Hideo Yagi el Japanio.

En kadro de la 46-a UK okazis multaj aliaj kongresoj, jarkunvenoj, sesioj ktp. El pli gravaj ni mencias:

Internacia Somera Universitato: antaŭ multaj ĉeestantoj paroladis Prof. Waringhien, Prof. Dro L. Lapenna, Mag. W. Auld, Prof.Dro.Djoudieff, Dro.H. Yagi kaj aliaj.

Internacia Arta Festivalo okazis la unuan fojon. Multaj artkolektivoj prezentis siajn programerojn: Kulturarta societo "B. Cvetkoviĉ" el Beogrado dancis jugoslavajn popolajn dancojn, ses teatraĵoj estis luditaj de la Internacia Arta Teatro kun sidejo en Parizo kaj ankaŭ de aliaj grupoj. Oni ludis mezepokan francan komedion "Advokato Patleno", unuaktaĵojn "La Homa Voĉo", "La Respektinda P..." k.a. kun granda sukceso.

Krome okazis dum la Festivalo filmprojekcioj, poezio-horetoj, koncertoj, muzika vespero, k.a.

En la Belarta konkurso ankaŭ ĉi-jare sukcesis ĉeĥoslovaj kaj gesamideanoj: Honoran Mencion gajnis s-ino E. Urbanová kaj s-ro J. Kořínek en branĉo "Originala Poezio". Unuan premion en "Originala Prozo ricevis s-ro Váňa Vlad. Ni kore al ĉiuj gratulas!

Ankaŭ la Internacia Ligo de Esp. Instruistoj okazigis sian kunvenon. Oni konstatis, ke en la lerne-jaro 1960/61 estis Esperanto instruata en 462 lernejoj de 14 landoj. Da esperantistaj instruistoj en diversaj landoj estas 9801 laŭ disponeblaj informoj.

En Londono okazis seminario "Oriento-Okcidento", kie oni traktis pri helpo de Esperanto en interŝanĝo de kulturaj verkoj inter Oriento kaj Okcidento. Aperis unua libro de ties celado – Malsata ŝtono" de R. Tagore (tradukis hinde, s-ano L. Sinha).

Venonta Universala Kongreso de Esperanto, jam la 47-a okazos en 1962 en Kopenhago, Danlando.

Hungario: En Miskolc fondiĝis Departamenta Esperanto Komitato por regionoj Borsod-Abauj-Zemplen-Heves. Ĝi komencis aperigi novan cirkuleron, plejparte en la hungara lingvo.

La Hungara Esperanto-Asocio eldonis unuan numeron de enhavoriĉa kaj luksa revuo "Hungara vivo". Ĝi aperos kvaronjare, estontece dumonate. Per ĝi pliiĝis la nombro de esp.gazetoj en socialistaj landoj pri vere reprezenta gazeto. Ekestas Ekestas demando, ĉu la esper. publiko ne estos baldaŭ plensata de tiuspecaj gazetoj. Adreso: Hungara Esp. Asocio, Budapeŝto V., Petöfi S. utca 17.

-.-

Bulgarujo: La Esperanto-movado en ĉi tiu lando pli kaj pli fortiĝas. Laŭ lastaj sciigoj funkcias nun en la lando pli ol 100 societoj, multaj kursoj, ktp. En Bulgara Esp. Asocio estas aliĝintaj 6.400 geesperantistoj. BEA havas kaj moralan kaj politikan kaj monan subtenon de la ŝtato.

-.-

ESPERANTO-klarigojn en la porklientela horaro oni sukcesis aperigi jam en kelkaj landoj. Laste oni aperigis ĝin en Danio, pli frue jam uzis Esperanton Jugoslavio, Pollando, Germanujo kaj Hungario.

NIA SPEGULO.

La Uzina Klubo de "Třinecké železářny" malfermis la elementan kaj daŭrigan kursojn de Esperanto. La aliĝojn akceptas s-anino Milatová, telef. 2005.

La Esperanto-rondeto ĉe la Uzina Klubo Slezan en Místek organizas nunjare Esperanto-kursojn en (mankas fino, la tajpanto forgesis daŭrigi sur la sekva paĝo – rim. de cifereciganto)

En la Uzina Klubo de VŽKG fine de julio sukcese finis la E-kursan ekzamenon 12 gesanideanoj. Ĉiuj komencis la kurson en februaro.

La Esperanto-rondeto ĉe la Uzina Klubo de Slezan tradukis el "Pace" la artikolon "Letero de japana patro", kiun publikigis "Nová Svoboda". Nun ili preparas artikolojn el "Nuntempa Bulgario" por "Mladý svět". Ni rekomendas, ke ĉiuj kluboj komencu serioze labori je tiu kampo. - La sama rondeto sukcesis organizi kunlabore kun Bulgara Kultura Centro interesan paroladon pri Bulgario, akompanatan per la plej novaj, koloraj filmoj. Nun ili traktas kun la Bulgara Centro pri la sama afero.

La Uzina Klubo de VŽKG E-fako kunvenas en nova kunvenejo "Společenský dům" en Vítkovice, unua etaĝo, ĉambro n-ro 3, ĉiumerkrede je la 19a horo.

La Esperanto-rondeto de la Kultura Domo en Ostrava-Zábřeh aranĝis 6.8.1961 aŭtobusan ekskurson. En Přerov, Kroměříž kaj Olomouc ili renkontiĝis kun lokaj

esperantistoj.

RECENZOJ.

Adresaro de firmoj, kiuj uzas Fesperanton

en la internaciaj rilatoj komerco-industrio-turismo. Eldonis la Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (Piazza Oberdan 1-MILANO, Italio.) Temas pri prova listo, 37-paĝa, firmoj el 28 landoj, el Ĉeĥoslovakio figuras tie nur Tatra Kopřivnice, Jitex Písek, Okresní vlastivědné museum Písek. La "Centro" atendas pluajn aliĝilojn, ĝi akcelas la praktikan uzadon de Esperanto inter organizaĵoj neesperantistaj. La celo de praktika utiligo de Esperanto estas aprobinda, la klare aranĝita adresaro laŭ fakoj, varoj kaj nacioj estas konvena rimedo por kontaktigo. Prezo: 200 liroj.

-er

LA SUDA STELO-PROMETEO.

Riĉa kaj ampleksa revuo socia-literatura-arta, eldonata en Jugoslavio, redaktata de Drage Kralj (por La Suda Stelo) kaj Masao MIYAMOTO (por Prometeo). Tiu ĉi revuo jugoslava-japana estas bela ekzemplo de okcident-orienta kunlaboro, ĝia strebado pri internacieco estas sukcesa, staras egale en la triopo kun "Norda Prismo" kaj "La Nica Literatura Revuo." Al ĉiuj niaj esperantistoj ni arde rekomendas ĝin. Bedaŭrinde en nia lando ne estas por ĝi peranto. Adr. de la redakcio: Ljubljana, Miklošičeva 7, poŝtni predal 239, Jugoslavio.

TO HOAI: "LA GEEZOJ A-FU" kun aliaj rakontoj pri la Taj-nacimalplinulto en Nord-okcidento de Vjetnamio. La verko estis premiita en j. 1954-55 de la Asocio de vjeinamaj verkistoj kaj artistoj. La Esperantan tradukon pretigis NGUJEN MINH KIHN kaj en decembro 1960 eldonis Fremdlingwa eldonejo en Hanojo. Broŝurita, 190-paĝa.

Ekleginte la unuan rakonton, mi ne sciis tempe fiksi la okazadon. Feŭdaj rilatoj, priskribitaj en la libro, en forta impresivo memorigis al mi paseon, al nia generacio nekonatan. Sed tuj post krimoj kaj sociaj maljustaĵoj prenas subite sian rolon popola armeo, "kanboj" (funkciuloj de la rezistado) kaj sur paĝoj de la libro sin disvolvis akra naciliberiga batalo kontraŭ premado fare de francaj kaj ties servantoj, Tej-oj kaj marionetaj perfiduloj. Konstrua skemo de la rakontoj estas simpla, kronologia eltranĉo el vivo de batalanta kamparano, instrua pro sia psikologia eldesegno de ĉiuj gravaj motivoj de naciliberiga movado kontraŭ imperiismo.

La lingvaĵo estas bona, nur kelkloke min ĝenis unu kontrasto: unuflanke precizeco de unuopaj vortoj, kunmetaĵoj (kapharoj, bolkaldrono, freŝnaskito, radŝpini k.s.) duaflanke kelkaj miskomprenigaj aŭ nekutimaj dirmanieroj aŭ sintaksaj kunligoj iom diferencaj de internaciaj normoj de Esperanta stilo (eble eŭropa).

La eldona aktiveco de vjetnamaj esperantistoj, kiuj proksimigas al ni lastatempe vere celkonscie sian literaturon, estas dankinda kaj estas nia devo konatiĝi kun verkoj de l'Oriento rekte el plumo de aŭtoroj aŭ samnaciaj tradukantoj.

-er

TOTALA SUNEKLIPSO 15.II.1961.

Redaktoro Univ. Prof. Dro Leo Randič. Esperant-lingve verkis Dro Miloslavan Ljubič kaj Dro Gabriel Divjanovič, redaktis Ivo Rotkvič. Eldonis Astronomia Observatorio, Zagreb I, Optička 22, Jugoslavio.

Pri la enhavo do ĉi libreto trafe diras la aldonita folio, ke "ĝi estas pli esperantiste verda ol eklipse malluma." En la unua parto estas informoj pri la sunoklipso ĝenerale kaj pri la 15-a de februaro 1961 speciale. Interesa laŭ la enhavo, populara laŭ la formo. Estus bone aldoni koncizan vortareton de uzitaj astronomiaj terminoj. Fine de la libreto estas eksplikado pri la suneklipso ankaŭ en la lingvo angla kaj germana.

En la plua parto estas abunda kaj interesa materialo teksta kaj bilda pri la sukcesoj de la rondeto de junaj astronomoj-esperantistoj en Zagreb: ekesto kaj enhavo de la jam fama libro "Tragedio en la Universo", enhavo de scenario de filmo laŭ tiu ĉi libro, aŭguste sendita al la Rusa akademio uzi la nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto" por iuj fenomenoj sur la nove malkovrita malantaŭa surfaco de la Luno, konstruo de amatora radio-stacio parolanta Esperante, fondo dala esperantista tendumejo ĉo la Adriatika maro.

La laboro kaj la sukcesoj de junaj astronomoj-esperantistoj en Zagreb donas al ni jenan ekzemplon: labori per Esperanto, uzi ĝin, estas la plej bona poresperanta laboro.

J.C.

ANONCETOJ.

Tramista Esperanto-Societo ZET, R. Koncara 239, Zagreb V alvokas al amika letervespero por la Zamenhofa tago (15.12.61). La respondo garantiata

Zagrebaj tramistoj.

ESPERANTO EN LA SCIENCO. Vilho Setälä, Matinkylä.

"Vi jam legis novaĵon, ke la plej grava germana scienca instituto, Max-Planck-societo por progresigo, de sciencoj, intencas fondi internacian centron por scienca informado, kaj ĉe tio sciigis, ke ĝi volas serioze studi la eblecon uzi por koncernaj dokumentoj la internacian lingvon. Kaŭze de tio 22 sciencistoj el Finnlando sendis al la Instituto kuraĝigan leteron, opiniante, ke Esperanto plej bone servos por internacia scienca informado. La unuaj subskribintoj estas prof. Paavo Ravila, eksrektoro de la Universitato de Helsinko kaj prof. Yrjö-Väisälä, emerita profesoro de astronomio kaj fiziko en la Universitato de Turku (la sama, kiu jam antaŭ jaroj donis al du planetetoj la nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto") ambaŭ estas membroj de la plej grava kultura instituto de Finnlando, la Akademio de Finnlando. Inter la aliaj subskribintoj estas eksprezidanto de la Scienca Akademio Fina, profesoro Vilho Väisälä, direktoroj de fakaj institutoj, profesoroj de finna lingvo, de fonetiko, matematiko, geodezio, internacia jaro, filozofio, farmacia kemio, limnologio, rektoro de instruista altlernejo, ktp. Espereble aliĝos simile eminentaj sciencistoj el aliaj landoj al sama deziro. Se iu bezonas, por kolektado de nomoj sub koncerna adreso, li povas ricevi la tekston kaj plenan liston de ĝisnunaj subskriboj el la redakcia de Esperanta Finnlando.

Vilho Setälä

Fajrero estas bulteno de E-junularo en Nordmoravio.

Aperas laŭbezone. Novembro 1961 n-ro 4/1961.

Eldonas: ZK ROH Třinecké železářny VŘSR, E-kroužek

Redaktas: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner,

Jar. Novotný, Ostrava I, Tyršova 11 (resp.)

Administras: Vl. Kočvara, Ostrava 8, Kamenec 3/251

ČSSR

ZK-ROH TŽ VŘSR T-03*11935